

antaŭ kaj kvin jarojn post kultivado de la unuaj transgenaj kotonplantoj la parazitaj estis kompute nombrataj dum la travintra sezono.

La esploristoj venis al la konkludo, ke – inklude de ĉiuj meteorologiaj influoj – oni povis observi, plej malfrue post du jaroj, evidentan malplialtiĝon de la parazitaj populacioj. Ankaŭ en la sekvaj jaroj reduktiĝis la parazita infestado.

Sur aliaj kotonplantaĝoj en Arizono, kie la plantoj estis tradicie traktataj sole per venenŝprucigiloj, la parazitpopulacioj evidente ne povis esti malkreske influataj. En Usono la kultivada areo de Bt-kotono daŭre de la '90aj jaroj pliampleksiĝis al ĉ. kvar milionoj da hektaroj – mondvasse al ses milionoj da hektaroj.

(Fonto: FAZ, *Natur und Wissenschaft*, 2003-02-05, p. N1)

(Se vi ankoraŭ ne faris tion: bonvolu trastudi nun la artikolon de S.M. Milnera "Kotono el ekologia kultivado kaj riskoj por la saneco", kiu aperis en SR 2/2002 (Sci. Rev. 53 (2002) p.71-96) por pluinformi vin pri problemoj de kotonkultivado.)

## La ekzakta centro de Eŭropo troviĝas en...

– trifoje vi divenu! Sen plulegi aŭ konsulti atlasen!! Pripensu!

Nu, la afero estas precize elkalkulita pere de tute neŭtrala – almenaŭ tiel konsiderata – instanco, nome de la "Nacia Geografia Instituto de Francujo". Laŭ ties fundaj sciencaj kalkuladoj troviĝas la Centro de Eŭropo en Litovio, proksime de ties regurbo Vilno. Pli precize, je 25°19' de orienta longitudo kaj 54°54' de norda latitudo. Surloke markas adekvate enskribita ŝtonego sur herbejo la "Geografian Centron de Eŭropo". Tiu ĉi tre verŝajne estas la ĝusta! Tamen, ankaŭ la ukrainanoj kaj la slovakoj pretendas je "situo de eŭropa centro" en siaj respektivaj landoj. Sed tion ili estas elkalkulintaj mem...

(Fonto: Brockhaus Enciklopedia Kalendaro 2003-05-06)

## Diamantoj – la plej ŝatataj amikoj de knabinoj

Ĉiu scias, ke lige kun tio ĉi eĉ ekstremaj leĝerpezaĵoj povas kosti treege multe. Sed kial ni parolas ĉe la brila ornamaĵo pri "karato"? Tiu vorto devenas el la Araba "qīrāt" kiu siaflanke devenas el la malnovgreka "kerátion". Kaj tio signifas "eta korno", korneto. Temas pri semoj de la karob-arbo, kiujn oni en praaj tempoj uzis por mezuri oron kaj juvelŝtonojn. Ekde 1907 validas la "metra karato", kiu egalas al 0,2 g. Ties subdivido ne plu okazas per frakcia nombro, sed

estas esprimata nuntempe per decimalo. 1,25 aŭ 1,5 karatoj do estas por *Elizabeth Schneider* el Germanujo aŭ *Lisbeta Snyder* el Svislando jam bona "ŝatata amiko". Fama usona filmstelulino *Liz Taylor* certe juĝus tion iom alie... (Fonto: Brockhaus Enciklopedia-kalendaro: 2002-11-21)

## Seka sablo post piedpremo?


Ĉiu konas tion: irante laŭlonge la plaĝo – sur malseka sablo – dum forflua akvo, la spaco ĉirkaŭ la piedo nelongdaŭre sekiĝas. Ĉu eble la piedpremo premsekigas la sablon? Tute ne.

La brita fizikisto *Osborne Reynolds* (1842-1885) elmontris jam en la jaro 1885, ke tia supozo kontraŭas aliajn observadojn – ekzemple kiam oni suriras malsekan tapiŝon tiam evoluas ĉirkaŭ la piedpremsignoj ne sekaj lokoj, sed akvoplenaj flakoj!

Je la plaĝo la sableroj estas bone ordigitaj laŭ optimuma sablogloba pakumo. Tretante sur ĝin, la "dia ordo" de la sableroj estas detruita kaj rezultigas plivastigadon de la interspacoj inter la unuopaj sableroj, tra kiuj la akvo eliĝas. Vere mirakla afero...

(Fonto: Brockhaus Enciklopedia Kalendaro 2002-07-17)

## La mezureble plej produktiva matematikisto



estis la sviso *Leonhard EULER* (1707-1783), kiu okupiĝis pri ĉiuj kampoj de pura kaj aplika matematiko. Li kreis la modernan nombroteorion, laboris pri planedomoviĝo, ŝipkonstruado, muziko, diferencialaj ekvacioj, geometrio k.t.p. Al la Peterburga "Akademio de la Sciencoj" li promesis heredigi traktaĵojn, kies presado bezonus 20 jarojn. Oni komence primokis tion – sed post lia morto ne plu. Ĉar 20 jaroj ne sufiĉis...

La postlasaĵo sumiĝis al 72 volumoj kun entute 30 000 prespaĝoj. Aldoniĝis kelkamilaj paĝoj de manuskriptoj, skizoj, projektoj, 3000 paĝoj el noticlibroj kaj leterinterŝanĝoj, kiuj plenigis denove 12 volumojn kun amplekso de ankoraŭfoje 3000 paĝoj. En la matematiko la nomo de *Euler* estas ligita kun pli ol 50 teoremoj, formuloj, funkcioj, ekvacioj...

(Fonto: Brockhaus Enciklopedia Kalendaro 2003-05-08)